

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
116
printempo 2019



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

<http://www.facebook.com/esperantoprovence>

prezidanto

Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkotiĝo (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Nicole Lafitte
(ĉe la supra adreso de
Pierre Oliva)

sekretario

redaktoro kaj enpaŝiganto

Pascal Vilain
61 Montée du Castelar
83460 Taradeau
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°
25-a de junio 2019**

bonvolu sendi al la supra retadreso
><><
antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la Prezidanto

Kian belan membro-kunvenon ni travivis en Les Issambres!
Ni estis multnombraj kaj interŝanĝis informojn efike kaj agrable.
Depost tiu tago, nenio grava okazis, krom la fakto, ke nia projekto pri
«La Espero» progresas. Pri tio, legu pli je la paĝoj 2-3.
Memorigu al viaj samklubanoj ĉirkaŭ vi, ke kelkaj el ili ankoraŭ ne
pagis sian kotizon - 6 € - al Espéranto-Provence; ĝi ebligas la eldonon
kaj sendon de nia gazeto. Antaŭdankojn!
Mi esperas, ke la printempo alportos al vi florojn kaj facilecon en via
laboro per kaj por Esperanto.

Pierre Oliva



enhavo

2	federacia agado	10	tradukaĵo: "Foriri"
3	el la regionaj asocioj	11	paĝo de la komencantoj
8	ZEO en Fontaine-de-Vaucluse	12	mesaĝkesto agendo
9	nekrologo	+	nur en la reta versio: raporto pri MES de Liba Gabalda

Federacia agado

Membro-kunveno

Ĝi okazis la 3-an de marto en Les Issambres.
Ĉiu el vi, kiu ĉeestis la kunvenon aŭ sendis rajtigilon,
ricevis la protokolon. Ankaŭ la aliaj povas ricevi la
retan version, laŭpete.

Se vi ne uzas komputilon kaj ŝatus ricevi paperan
version de tiu protokolo, ne hezitu tion peti de la
federacia sekretario.

(kontaktindikoj en la kolofono je la 1a paĝo)



25 membroj partoprenis en la kunveno



Nia himno LA ESPERO interpretita de lirika kantistino subtenita de simfonia orkestro... Ĉu tion vi imagis? Tion ni faros!

Kun la flago kaj la verda stelo, nia himno estas unu el la ĉefaj simboloj de nia movado. Ĝi meritas pli ol simplan pianan akompanadon. Ni planas orkestri ĝin, sen ŝanĝi noton nek vorton, per latun-, kord- kaj frapinstrumentoj, kiuj donos al ĝi amplekson neniam konatan.

Ni do volas disvolvi KD-on, en kiu "La Espero" estos interpretita de lirika kantistino kun la akompanado de simfonia orkestro. Aliaj muzikaj kreaĵoj estos aldonitaj. Espéranto-Provence proponis al ni financan helpon kaj antaŭmendon de kelkaj KD-oj, kiam ili estos faritaj.

Por efektiviĝi la projekton, ni havas inter ni spertajn muzikistojn kaj registrado-studion, kiu gastigos nin, kiam venos la oportuna momento. Ni havas ankaŭ la subtenon de Vinilkosmo. Tiel inter ni estas sperta aŭtoro-komponisto-interpretisto, Jean-Claude Roger, kiu kreas la orkestradon kaj kiu intervenis ĉe la landa kongreso de Espéranto-France en 2016 en Marsejlo. Ni havas la kunlaboradon de lirika kantistino, Vanessa Pont, kiu spertas same pri klasika muziko, ĵazo kaj tekstaj kantoj.

Ni rilatas kun KissKissBankBank, la internacie konata amasfinanciga platformo, kiu helpas nin kolekti monrimedojn tra la 5 kontinentoj.

Ni deziras direkti nin al la tutmonda Esperanto-movado. La subteno de UEA estas do nepra.

Ni akiris ĝin: la prezidanto de UEA, Mark Fettes, donis al ni sian moralan apogon, skribante subtenvortojn kaj donante sian foton. Ili aperas en la projekt-retejo.

Ni ankaŭ alvokis la organizaĵojn, kiuj estas ligitaj al la tutmonda Esperanto-movado kaj ĝiajn reprezentantojn en la tuta mondo. Ni aparte celis la Aziajn landojn (Ĉinion, Sud-Koreion, Japanion), la Amerikan kontinenton (precipe Brazilon, Kanadon, Usonon), kaj kompreneble Eŭropon.

La amasfinanciga platformo KissKissBankBank, kiun ni elektis, helpas nin atingi niajn celojn.

La projekto postulas 10 000 €. Ni serĉas nian financadon per KissKissBankBank (5 000 €), kaj aliaj 5 000 € tra UEA, Espéranto-France, Espéranto-Provence. Per tiuj 10 000 €, ni pagos :

Orkestro: 4 kordinstrumentoj, 3 lignaj blovinstrumentoj, 3 latunaj blovinstrumentoj, piano, basgitaro, drumo, akordiono kaj kantistino = 5 500 €

Studio: registrado, miksaĵo, matricfarado = 2 800 €

KD-fabrikado: tuŝkonceptado, KD-presado = 1 700 €

Se ni ne sukcesos akiri ĉi tiun kompletan sumon, ni resendos la kontribuadojn al la donacintoj.

Ni kreis TTT-ejon, kiu klarigas nian projekton:

<http://www.kanto-espero.org/>

Ni dankas vin pro via intereso pri unu el niaj ĉefaj simboloj.

Se vi deziras helpi al ni realigi tiun mirindan projekton, bonvolu mondonaci ĉe :

<https://www.kisskissbankbank.com/fr/projects/esperanto-kaj-la-franca-frate-en-komuna-muzika-projekto>

La organizantoj, membroj de UEA, Espéranto-France kaj Espéranto-Provence: Marc Gallardo, Thierry Spanjaard Ankaŭ ili partoprenas en la projekto:

mastrumado: Renée Triolle, Pierre Oliva, Rosy Inaudi, Jean-Claude Roger, Brigitte Roger, Chantal Beaumont

muzikado: Jean-Claude Roger, Vanessa Pont, Philippe Allegrini, Floréal Martorell (Vinilkosmo), Miguel Gutiérrez Adüriz

El la regionaj asocioj



04 - E.K.E.M. Esperanta Kulturo en Manosque

Lors de son assemblée générale de janvier, EKEM a décidé de se mettre en sommeil. Donc pour 2019 : aucun bureau (président, trésorier...), ni cotisation EKEM ; gel des mouvements sur le compte bancaire ; pas de demande de salle pour 2019 ; pas d'activités extérieures.

Les intéressés pourront se retrouver après un travail personnel proposé et profiter de la présence de Patrick Lagrange pour des questions, approfondir la structure de la langue en parlant l'espéranto. Claudia et François Mimmersheim, très intéressés par cette formule avec Patrick, proposent d'inviter chez eux pour ces séances, dans leur disponibilité d'une fois par mois.



13 - Espéranto - La Ciotat

Renée Triolle

Usonanoj en La Ciotat la 3an de januaro Fulmotondra zigzaga vizito de la Prezidanto de la Esperanto-klubo en Vaŝingtono DC.

Profitante la malaltajn tarifojn de la flugoj, **James Ryan kaj lia edzino Melinda** vojaĝis al Francio kaj vizitis Provencon dum unu semajno.

Havante grandegajn kofrojn, ili luprenis aŭton sed mistaksis la vojojn en nia regiono. Sekve, ni atendis ilin en La Ciotat por tagmanĝo kaj ili alvenis... je la 14a por festa pikniko, kun salmaĵo, gras-hepataĵo kaj reĝa kuko. Je la 16a, ili startis al Marsejlo por vidi sunsubiron sur la maron kaj la If-kastelon. Plezure Rosy kaj Marko veturigis ilin sed Jim naŭzis pro la survojaj kurboj...



La postan matenon, ili forveturis je la 11a30 kun la intenco viziti Marsejlon, veturi al Saintes-Marie kaj tranokti en Aix!

Ili estas la unuaj vizitantoj, kiuj eĉ ne okulumas al nia urbeto, al la maro aŭ al mia bieno!

Feliĉe la diskutoj estis interesaj: Jim laboras por la usona ŝtato ĉe la nacia servo kontraŭ diskriminacioj (religiaj, seksaj, etnaj, handikapaj ktp), sed laŭ "usona maniero" mi diru, t. e. evitante proceson. Li atentigis, ke li ne estas advokato sed publicisto. Vespere, ni multe diskutis kun Melinda pri migrantoj.

Estante mem el Peruo, kie ili konatiĝis antaŭ ok jaroj, ŝi havas personan sperton pri la malfacileco konservi siajn radikojn, kvankam ŝi forte subtenas, ke migrinto devas iĝi bona civitano de la akceptinta lando, kaj respekti la leĝojn kaj la homojn.

Vizito de kroata esperantisto, Alan Neven Kovačić

La Ciotat ĉiam kandidatiĝas por akcepti la prelegantojn proponitajn de Espéranto-France.

Dum la februaraj ferioj alvenis kroato, tre bona esperantisto kaj lingvisto, kiu laboris eksterlande, spertas pri turismo kaj parolas multajn lingvojn.

Li estis akceptita jaŭdon la 14an de februaro de Marko kaj Rosy, kiuj promeniĝis lin tra Marseille, de la monteta preĝejo Di-patrino ĝis la malnova haveno, kaj li unuan fojon veturis per elektra aŭto, tute senbrue "kvazaŭ oni ŝvebus".

En La Ciotat, vendrede, li piedpromenis laŭ la marbordo en la iama bieno de la patro de fratoj Lumière kaj tagmanĝis kun nova esperantisto, Marc.

Poste ni kune veturis al Le Beausset tra la vinberujoj kaj estis varme akceptitaj de la turisma oficistino, vizitis ekspozicion pri Portalis kaj hazarde renkontis la estron de kultura asocio. Vespere, ni vizitis koncerton de kanzonoj de Édith Piaf. Sabate matene, piediro al la fjordoj, Figuerolles, kie ni renkontis ukrainojn, kaj Le Mugel, kie ni renkontis polojn...

Plej trafa por li estis la pikniko ekstere sur la teraso, en T-ĉemizo, (imagu, en februaro!),



Sekvis rapida vizito de la malnova urbo, kie okazis lia prelego. Nur dek du homoj sed miksita publiko: esperantistoj, kutimaj scivolemuloj de Grand Portique (la asocio, kiu gastigas nin) kaj "novuloj", kuj planas vojaĝi al Kroatio somere. Diversaj intereso, diversaj demandoj, kaj plian fojon ni konstatis, kiom analfabetoj ni estas rilate la kulturon neanglan!

La informo aperis en la urba gazeto, en La Provence kaj venis la urba televido 13600TV.

"Journée Mondiale de la langue maternelle" à l'initiative de l'UNESCO

Parmi les 7000 langues du monde, on assiste à la disparition des "petites" langues, parlées par un faible nombre de locuteurs ou mises au ban de la société mondialisée.

Jeudi 21 février, Espéranto-La Ciotat a organisé au Grand Portique une soirée amicale où chacun a pu faire entendre sa langue maternelle, indépendamment de son statut (langue officielle, patois, créole) car toute langue porte une vision de la société, des rapports à la nature et un mode de pensée.

2019 est l'Année Internationale des Langues Autochtones, un sujet cher au monde espérantophone car l'espéranto reste le meilleur allié des langues, "le Robin des Bois des langues", en proposant une alternative à l'utilisation de la langue du dominant.

Ekspozicio en la biblioteko de Lycée de la Méditerranée en La Ciotat

De la 11a ĝis la 18a de marto, la bibliotekistoj akceptis ekspozicion pri Esperanto.

Ĝi konsistis ĉefe el la **alfabeto desegnita de Christine Biancheri, afiŝoj de Espéranto-France** pri la diversaj eblecoj komuniki, kaj kelkaj libroj, cele al la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, ekzemple "La okcitana" de JoMo, "1000 eŭskaj proverboj", "Kiel Bretono iĝis reĝo de Anglujo", "Ne facilas esti sloveno en Italio", "Tra l'okuloj de l' venkitoj" (indiĝenaj rakontoj pri konkero de Meksiko), apud "klasikaj" Tinĉjo kaj aliaj.

La informo aperis en la interna ttt-ejo de la lernejo; lernanto Titouan sin proponis por ĝin komenti al la vizitantoj okaze de la "malferma tago" sabate la 16an. Se 500 familioj vizitis la lernejon, kelkdekoj vizitis la bibliotekon.

Interese estas, ke la estrino malpermesis uzi la vortojn "supereco, subpremo, diskriminacio" de fortaj lingvoj, same kiel ŝi malpermesis disdoni informilon pri la rusa lingvo, eldonitan de la Asocio de Francaj Rusistoj cele al lernejoj...





Renée Triolle

Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj

Le mardi 22 janvier, une douzaine d'espérantistes, anciens ou nouveaux, étaient présents pour le lancement de l'**Année Internationale des Langues Autochtones**.

En effet, à l'initiative de l'ONU avec l'UNESCO pour maître d'œuvre, 2019 doit attirer l'attention sur les langues autochtones, moyen de communication éducatif et social mais surtout "référentiel de l'identité de chacun, de l'histoire culturelle, des traditions et de la mémoire". Malgré leur immense valeur, de nombreuses langues disparaissent chaque mois.

L'espéranto, en proposant une alternative à l'utilisation de la langue du plus fort qui sculpte en même temps les pensées, est à l'avant-garde du combat pour les "petites" langues.

Discussions animées et échanges se sont poursuivis autour du traditionnel gâteau des rois.

Mapuĉoj el Ĉilio "vizitas" nin

Dum la **Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj**, estas okazo atentigi la esperantistojn pri la minoritatoj.

Sekve, en konversacia kurso en Marsejlo, marde vespere estis studita teksto el " Etnismo" pri **mapuĉoj**: "Antaŭe ni estis ebruloj kaj mizeruloj, nur teroristoj" (n°102, dec. 2018).

Hazarde, la patrino kaj onklino de Victor (*ndlr: ano de Espéranto-Marseille*), mem el Ĉilio, vizitis Marsejlon. La 26an de februaro, Cecilia vizitis la kurson: komence ni faris demandojn en la franca pri Ĉilio. Tiu longega lando de Sud-Ameriko: 4 800 km de nordo al sudo (imagu, ĝis Siberio se ĝi kuŝus "horizontale"), 755 276 km² (komparu kun Francio, 555 000 km²).

Ĝi estas la malplej koruptita lando de Sud-Ameriko, eĉ se ne mankas korupto inter la superuloj (ofte politikistoj aŭ amikoj de Pinochet, kiuj havis postenon dum la diktaturo) kaj unu el la plej demokratia...

Cecilia bedaŭras la mankon de kulturo: unu sola biblioteko en la tria urbo de la lando; homoj pro manko de mono ne aĉetas librojn, ne vizitas kinejon ktp. kaj la junuloj, kiel ĉie en la mondo, metas la nazon nur sur ekranojn. Edukado kaj medicino estas senpagaj, sed "riĉuloj" preferas privatajn lernejojn al ŝtataj, ĉar la nivelo estas pli alta kaj la instruistoj pli kompetentaj. Ĉiuj junuloj esperas iĝi kuracisto aŭ inĝeniero, la plej bone pagitaj profesioj. Eĉ se la lando estis setlita de prahomoj (spuroj el 35 000 jaroj antaŭ Kristo), ĝi estis malkovrita de Magelano en 1520. Kaj kiel en ĉiuj kolonioj, la lingvo de la koloniistoj, tie la hispana, iĝis la ĉefa kaj malaperigis la indiĝenajn (3 el amerik-indiana grupo, i.a la mapuĉa), kaj unu el polinezia en la fame konata Paska Insulo.

Sekvis lego kaj diskuto de teksto eltirita el numero de Etnismo 2005 pri intervjuo de ĉefino: la **mapuĉoj** estis senigitaj de siaj teroj, diskriminaciitaj, batitaj, kaj enkarcerigitaj, kiam ili protestis. Ili daŭrigas sian batalon ĉe eŭropaj instancoj pri homaj rajtoj, ĉefe en Ĝenevo (Svislando).

baldaŭ
en Marsejlo



83 - Espéranto - Le Beausset

Exposition sur l'alphabet de l'espéranto

Le site "Agglomération Sud Sainte-Beaume" a relaté cet événement :

"Jusqu'au 11 janvier à 18 h, il est possible de découvrir l'exposition "**Sur le chemin de l'espéranto**". Cette semaine, l'espéranto est à l'honneur avec les œuvres de la plasticienne **Christine Biancheri** (*ndlr : membre de l'association Espéranto-Le Beausset*) ainsi que des panneaux pédagogiques où l'on apprend que l'espéranto fonctionne comme un jeu de construction :



Christine Biancheri



"Les mots sont formés simplement en ajoutant des préfixes et des terminaisons à une racine." La créativité du lexique de l'espéranto est ainsi sans limite.

Une exposition didactique à découvrir."



Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva

Vizito de eksterlandano

Duafoje en 2019, ni akceptis eksterlandan esperantiston en Le Beausset: **Alan Neven Kovačić**.

Li devenas el Kroatio kaj li profesie estas turismagento, klera kaj sperta, flue parolanta multajn lingvojn kaj Esperanton evidente.

Ni vizitis la turismejon, kie li interŝanĝis multajn ideojn kaj informojn kun la estrino kaj respondeculo de loka kultura asocio. Li interesiĝis pri ekspozicio de la fama franca kaj loka leĝisto Etienne-Marie Portalis, kreinto de nia Civila Kodo.

Poste ni promenis tra la urbeto, parolante pri ĉio tre libere. Dum tiuj diskutoj, ofte ni havis malsamajn vidpunktojn. Tre sperta kaj zorgoplena pri lingvaj problemoj, iomete naciista rilate sian landon, li severe juĝis Francion kiel ne samrajtigan ŝtaton, pro ĝia negaleco koncerne la lingvojn kaj la virinajn familinomojn.

Ni estis multe pli interesataj pri lia vidpunkto pri homaj

travivaĵoj, ĉefe rilate la eksan Jugoslavion dum kaj post la milito - kelkaj el ni spertis iomete tion antaŭe. Fakte, ni ne bone sukcesis klarigi punktojn pri pensmaniero en tiu geografia areo. Ne gravas... male, ni informiĝos plu.

Feliĉe, dum lia prelego en La Ciotat pri «Kroatio, hieraŭ kaj hodiaŭ», ni malkovris multajn faktojn pri salajroj, vivkosto, ekonomio, turismaj lokoj en Kroatio. Kiel kutime, ni pasigis agrablajn momentojn kun tiu samideano.



Alan, meze, kun samideanoj el Le Beausset kaj La Ciotat

Trans-Pirenea Esperanta Koruso

Ni, Pierre kaj Nicole, partoprenis tiun 26an kantstaĝon en la ĉarma vilaĝo La Bastide-sur-l'Hers. Estis ĉiuj kondiĉoj por pasigi feliĉan semajnon: amikega kaj ĝoja etoso; komfortaj loĝejoj en dometoj de la FERIA Centro; bongustaj nutraĵoj kiel en Suda Francio; ne deviga ĉeesto al koruso por akompanantoj. Tiel, lokuloj, belgoj, svis-germano, kroato, aliaj francoj (Céline, Monique kaj Francis Bernard, la geredaktoroj de «Espéranto-Info»), ĉiuj inter 9 kaj 84-jaraĝaj, kantis kune en Esperanto.



La korusestrino, **Rineke Hoens**, el Nederlando, estis muzike postulema sed tre pedagogia kaj amika dum kursoj, kiuj daŭris kvin horojn tage. Ŝia repertuaro enhavis polifoniajn kaj popolajn kantojn por kvar voĉoj, ĉefe germanajn kaj skandinavajn. Estis i.a. du kantoj de Josquin des Prés, fama belg-franca komponisto el la renesanca periodo. Oportune, pro la 8a de marto, ŝi aldonis du kantojn dediĉitajn al virinoj por agnoski iliajn dignon kaj liberecon.

Restis multaj eblecoj posttagmeze antaŭ la sesa: belaj kamparaj promenvojoj; vizito de la katara Kastelo Montségur; malkovro de la laboro de manlaboristo, kiu fabrikas objektojn kaj kombilojn el korno; legadoj danke al la riĉa biblioteko de la Centro. Kelkaj ankaŭ iris ĝis la neĝkovrita montaro, aliaj desegnis kaj pentris kun Pierre. Vespere, ni elektis babiladojn kaj interkonatiĝojn, krom du prelegoj: «Historio de Kroatio»,

kun Alan Neven Kovačić; «legi-skribi-kanti facile per gestoj» kun Brigitte, el la asocio «La boîte aux lettres». La staĝo finiĝis per 2 koncertoj: la unua en la vilaĝa pensiulejo; la dua en proksima Aude, en la bela

urbeto Fanjeaux, alte lokita. Tie, kun alia bretona koruso, ni entuziasmigis la publikon.

Ĝis la venonta staĝo! Kaj... ankaŭ vi venu!

Kontaktoj: tutpeko@aliceadsl.fr

<http://esperanto.ariège.free.fr>



83 - Esperanto-Klubo Saint-Raphaël

Pascal Vilain

Membro-kunveno

La dato estis zorge notita sur la agendo de ĉiuj membroj de la klubo: dimanĉon la 3an de februaro, ni kuniĝis ĉe Monique kaj Pierrot por la tradicia reĝkuko. Babilemuloj venis jam antaŭtagmeze por profiti komunan tagmanĝon en amika etoso.

Sed ni ne estis tie por nura manĝado: ekde la 15a komenciĝis la membro-kunveno, kiu pritraktis kelkajn gravajn punktojn, i.a. la eblan elekton de la grupa kotizo proponita de Espéranto-France.



Usonanoj en Saint-Raphaël

James Ryan, prezidanto de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono (Usono) kal lia edzino gastis ĉe Monique kaj Pierrot Prezioso la 5an de januaro. Post la vespermanĝo okazis prelegeto, en kiu ĉeestis kelkaj lokaj samideanoj.

Pri kio emis paroli tiu Usonano? Pri sia prezidento Trump, kiun li ne ŝatas? Pri la tiam plursemajna paralizo de la usona administracio, kiu momente senigis lin je salajro? Jes, li iomete parolis pri tio...

Sed James ĉefe pritraktis la eŭropan politikon, diskutis pri "la briteliro, ŝanco por Esperanto, kiun la eŭropaj esperantistoj nepre ne maltrafu". Li ankaŭ aludis pri la enmigrado, kiu celas Eŭropon, donante sian vidpunkton: "ne jes aŭ ne, sed kiom, kiel"... La prelegon sekvis interesa kaj vigla debato.



Mediterranea Esperanto-Semajno

Maggy Combot

Kia bona sento revidi miajn internaciajn geamikojn !

Ĉi-jare ĉeestis preskaŭ **100 partoprenantoj** el dek diversaj landoj... kaj tute ne estis problemo por konversacii unu kun la alia !

Kvar gvidantoj (**Emanuele Regano**, **Michel Dechy**, **Katerina Arbekova**, **Christine Graissaguel**) helpis nin progresi en la lingvuzo per kursoj matene kaj iomete vespere.

Sed posttagmeze eblis partopreni ekskursojn, provludi teatraĵojn kun **Nina**, kunkanti en la ĥoro de **Bernard**, aŭ plenigi mem sian libertempon aŭ simple profiti la sudan sunon, la lazuran maron (ĉeestis Belga *urso*, kiu naĝis en akvo 9-grada !) kaj la belajn pejzaĝojn.

Eĉ post la vespermanĝo oni okupis nin per interesaj prelegoj, dokumenta filmo kaj amuza distra vespero. Enui tute ne eblis.

Feliĉe restas la ĉiam pli granda amikeco kaj la fotoj kiel belaj memoraĵoj.

Dankon al ĉiuj kaj ĝis venonta jaro!



la kursanoj de Michel Dechy

Pri MES 2019, legu pli danke al artikolo de Var-Matin (je la sekva paĝo) kaj teksto kaj fotaro senditaj de staĝinto, Liba Gabalda, kiun ni kore dankas! (aldonitaj dokumentoj nur por la reta versio de nia gazeto)

ROQUEBRUNE-SUR-ARGENS

L'espéranto, langue bien vivante !

Comme chaque année, les Issambres accueillent les Espérantistes pour une semaine de stage

Depuis le samedi 2 mars, les murs du Vacancier des Issambres retentissent d'un langage inconnu des non initiés. Venus de France et de l'étranger, les quatre-vingt-treize stagiaires de la « Mediteranea esperanto semajno » communiquent sans difficulté apparente, non pas en anglais première langue d'échange international, mais dans la langue vivante la plus moderne existant au monde : l'Espéranto. Créé en 1887 par le docteur polonais Louis-Lazare Zamenhof en quête d'une langue capable d'unir les peuples lors de leurs échanges parlés et écrits, l'espéranto propose un langage différent construit à partir de racines de mots les plus connus afin que tous les peuples soient à pied d'égalité lors de leurs échanges. Avec ses seize règles de grammaire sans exception et ses verbes conjugués de la même manière avec seulement douze terminaisons verbales, ce dialecte phonétique logique est le plus facile à apprendre. En un an en moyenne, ses pratiquants peuvent s'exprimer aisément. Son autre atout étant qu'il aide à l'apprentissage d'autres idiomes. « Je ne parlais que mon patois breton en dehors du français », explique Monique Prezioso, secrétaire de l'espéranto club Frédéric-Saint-Raphaël. *Mon mari a voulu que j'apprenne l'anglais, mais sans succès. J'ai alors lu un article dans Nice-Matin sur un congrès d'espéranto. Et moi qui n'avais jamais appris d'autres langues, j'ai d'abord commencé par l'écrire puis plus tard j'ai osé le parler.* L'espéranto redonne aussi un état d'esprit de tolérance et d'humani-



Photo-souvenir pour les stagiaires de la « Mediteranea esperanto semajno » venus approfondir leur connaissance de l'espéranto aux Issambres pendant toute la semaine. (Photos Fred M.)

smis. Sans nul doute inhérent à son concepteur confronté à l'usage de trois langues différentes dans son pays : le yiddish, le russe et le polonais.

Plus de 70 pays

Pour Daniel Moirand, enseignant de russe et d'espéranto à l'université d'Alsace-Provence, « tous les pays sont affectés par l'espéranto. Et grâce à son *Pasporta servo* (consulaire mondial), il a permis, bien avant l'ère du surf coaching, l'accueil et la convivialité dans une communauté d'idées et d'idéaux ». Pour les Espérantistes, leur langue gomme les différences entre les peuples. Elle est internationale et fédératrice. « Elle est moins difficile à utiliser car il n'y a plus le handicap de langue entre les pays, ajoute Michel Dechy l'un des trois intervenants mandatés pendant cette semaine. Et on accueille toutes les communautés quelles que soient leur religion ou leur origine.

Zamenhof était moderne. Il espérait qu'en se comprenant mieux, on s'entendrait mieux. Zamenhof a fait cadeau de sa langue qui appartient désormais à ses locuteurs. Après son apparition, l'espéranto s'est rapidement répandu sur les cinq continents symbolisé par son étoile verte à cinq branches. Depuis 1905, les espérantophones se réunissent pour leur congrès mondial annuel auquel participent aujourd'hui quelque soixante-dix pays. Et si Louis-Lazare Zamenhof n'a jamais reçu le Prix Nobel de la paix, de nombreuses rues portent son nom tel qu'à Saint-Raphaël où sa fille était venue assister à l'événement avant que n'éclate la Seconde guerre mondiale. « Dankon doctor ! »

FRED M.

▲ Espéranto club Frédéric-Saint-Raphaël : 04.94.83.06.88 ou 04.94.95.66.18. Site internet pour la France : <https://esperanto-france.org>

Elle a dit

« Je suis devenue professeure de langues grâce à l'espéranto »



Katerina Arbekova

À dix-neuf ans j'ai pu réaliser mon rêve d'enfant d'apprendre l'espéranto. Étudiante en agriculture à Novossibirsk en Sibérie, j'ai rencontré un espérantiste qui m'a donné deux cours et un livre pour étudier la langue. Je l'ai apprise en un mois. C'était extraordinaire pour moi. Je ne pensais pas devenir professeure mais après avoir terminé mes études, je me suis inscrite en langues. L'espéranto m'a beaucoup aidée. Et j'enseigne maintenant l'anglais et l'espéranto dans un centre social pour jeunes en Russie. Grâce à l'espéranto, j'ai aussi voyagé dans de nombreux pays et j'ai des amis partout dans le monde avec qui je peux échanger sans difficulté.

ZEO-oj en Regiono SUD > 8 - Fontaine-de-Vaucluse (84)

Post Carpentras (n° 112), Cavailon (n° 114), jen plia ZEO en la departemento Vaucluse, ĉifoje en Fontaine-de-Vaucluse.

Neniu strato aŭ parketo Zamenhof, nek apartamentaro Esperanto... sed plato dediĉita al Petrarko.

Kial tiu plato ? Kiu estis Petrarko ?

Francisko Petrarko (Francesco Petrarca - 1304-1374) estis itala humanisto, kiu verkis en la itala kaj latina.

Li estis fama reprezentanto de la Itala Renesanco.

Parton de sia junaĝo li pasigis en Avinjono, tiutempe la rezidejo de la papoj, kaj li ekstudis juron unue en la universitato de Montpeliero, poste en Bolonjo.


Post la morto de la patro en 1326, li reiris al Avinjono.

En la jaro 1327 okazis la ĉefa evento de lia vivo: Petrarko kaj Laŭra renkontiĝis sur la perono de la preĝejo Sankta Klara.

Eĉ la PIV aludas la amatino de Petrarko:

> *Laŭro* : virina nomo, i.a. de la amatino de Petrarko.

En la jaro 1337, Petrarko forlasis Avinjonon kaj retiriĝis (li estis 33-jara) en vilaĝeton Vaŭkluzo, kie li vivis 9 jarojn.



En ĉi tiun fermitan valon, fuĝante la plezurojn mondumajn, Francisko Petrarko venis ŝirmi sian meditadojn en aŭtuno de la jaro 1337. Fidela al la kulto de Laŭra kaj al la studado de la antikveco, nenian lokon li havis pli kara al sia koro nek pli favora al sia genio. La urbo Valkluzo al sia poeto - en aŭgusto 1937 (langue internationale ESPERANTO)

eltiraĵo el parolado prononcita la 15an de oktobro 1988 okaze de la inaŭguro de la Esperanta plato:

"Jam du platoj memorigas al ni tiun restadon. Ekde nun estas tria. Dank' al la afableco de la urbestro, dank' al la samideano, kiu ofertis tiun marmoran platon - kun traduko de nia Waringhien. Tiu nova plato atentigos milojn da turistoj pri Petrarko... kaj pri Esperanto!"



Ĉu "**Valkluzo**" (kiel sur la plato) aŭ "**Vaŭkluzo**" (nun plej ofte uzata)?

La nomo venas el la provenca "Vau-cluso", el la latina "Vallis Clausa", t.e. en la franca "la vallée close".

Alia dokumento trovita sur la reto parolas pri "Fonto de Valkluzo" (Fontaine-de-Vaucluse).

Ĉu vi havas opinion pri la plej trafa traduko ?

Nekrologo



La 14an de decembro 2018, kelkajn tagojn antaŭ sia 105a jariĝo, forpasis en Aix **Marcel Bourrelly**.

Li apartenis al tiu kategorio de esperantisto, kiu dediĉas grandan parton de sia vivo al la internacia lingvo sed ankaŭ al la regiona, la provenca.

Du filinoj, inter la kvar geinfanoj, estas konataj: Mireille Pacheu kaj Sylvaine Le Magadure, kiuj siavice havas esperantoparolantajn gefilojn. La tuta familio ludis teatraĵon okaze de la nacia kongreso de Espéranto-France en La Roque d'Anthéron kaj estis la lasta fojo, kiam mi renkontiĝis kun li.

Profesia lignaĵisto, li skribis siajn memoraĵojn, i.a longajn diskutojn pri la esenco de la vivo kun Victor Lebrun, sekretario de Tolstoj.

Pli ol 120 homoj ĉeestis la nekrologan ceremonion.

Espéranto-Provence sincere kondolencas.

Renée Triolle

Bedaŭrinde forpasis en 2019 ankaŭ tri anoj de nia federacio.

La 31an de januaro: **Viviane Ocelli**, el Contes (06)

Kun sia edzo Jean-Pierre, ŝi regule akceptis en sia hejmo esperantistojn, kiuj vizitis nian regionon, kaj ofte partoprenis en la renkontiĝoj proponitaj de niaj diversaj federaciaj kluboj.



La 1an de marto: **Michel Simon**, aktiva membro de "La Espero, Groupe espérantiste de Cannes et environs", fondita en 1968, kaj ĝia senlaca, entuziasma kaj efika prezidanto de 1993 ĝis la neaktivigo de la klubo en 2009.

Michel ankaŭ prezidis nian federacion kaj redaktis ĝian bultenon.



La 27an de marto: **Daniel Moirand**, el Aix-en-Provence, kiu antaŭ nelonge ĉeestis kun sia edzino Josianne la Mediteranean Esperanto-Semajnon en Les Issambres, kaj afable respondis al demandoj de ĵurnalistino de Var-Matin.

Artikolo pri Daniel estas legebla sur nia TTT-ejo kaj aperos en la julia numero de nia gazeto.

Espéranto-Provence sincere funebras kaj kondolencas la familianojn de Viviane, Michel kaj Daniel.

Tradukaĵo de Anita Collomb laŭ franca teksto de Claire, "Partir"

Foriri

Por vi Aleksandra,
foriri signifas
renkonti la alian,
malkovri vivmanierojn, kredojn,
tutmondajn lokojn,
kiuj vin allogas, fascinas, meditigas.

Kaj por vi, alveninte Francion,
foriri signifas
sin elŝiri el siaj radikoj, sia lando, sia kulturo,
fuĝi for de la fatalo,
eskapi el timo, angoro,
hororo, morto, senespero, malsato,
por sin savi, sin rekonstrui,
por finfine ripozi
kaj antaŭvidi sian estontecon,

Aleksandra,
vi ŝatas iri, pâsi
tra pejzaĝoj grandiozaj,
majestaj, pompaj.
Laŭlonge de viaj iradoj,
vi renkontas personojn,
kiuj nutras vin per interŝanĝoj.
Vi rikoltas memoraĵojn kaj bildojn
gravuritajn en via menso aŭ sur filmoj
kaj vi revenas post jaroj kun via filo,
riĉa je malkovraĵoj,
objektoj, pensoj,
tutaĵo da materialo,
kiuj naskas viajn multajn skribaĵojn.

Kaj vi, por alveni,
vi marŝas kaj trairas pejzaĝojn,
kie malamikeco, brutaleco, senkompato, danĝeroj,
homa frenezeco
venas maski, kaŝi, makuli la belecon de lokoj,
kie morto, sufero, humiligo minacas vin ĉiumomente.

Vi alvenas en Francion,
kun multaj bildoj, memoraĵoj, doloroj,
kelkafoje vundoj en via karno,
kiujn vi provas forgesi, enfosi;
sufero obsedas viajn pensojn nokte,

Vi Aleksandra, antaŭ pluraj jaroj,
vi jam koliziis kontraŭ hermetikaj limoj,
kaj vi, en 2018,
en nia bela departemento «Altaj Alpoj»
vi kolizias kontraŭ «patrola» limo...

«Kial mi naskiĝis je malbona flanko,
kaj vi en bona?»

Via demando plu restas gravurita
senresponde en via memoro.

Ĉie en Eŭropo, ĉie en la mondo,
ĉie la sama situacio!
Ĉie novaj muroj stariĝas por protekti limojn,
longa muro ĉirkaŭas la Teron,
unufoje kaj duone.

Absoluta frenezaĵo!

Por sin protekti kontraŭ kio, kontraŭ kiu... Kial?
Kontraŭ homoj serĉantaj iom da humaneco?
Ĉu ni perdis racion en tiu 21a jarcento?

Kion farus vi, Aleksandra, en 2018?
Ĉu vi ne estus granda marodistino,
arestita, akuzita, pro delikto de solidareco?
Ĉu vin ni ne renkontus
meze de solidara ŝnurteamo
manifestacianta ĉe la montpasejo « Echelles »,
aŭ ĉe tiu de Montgenèvre,
en Gap aŭ aliloke?
Ĉu vi ne parolintus
ĉe la Ĝenerala Konferenco en Briançon?
Ĉu vi ne kriegus
kontraŭ tiuj politikoj de neakceptado?

Mi tion imagas!
Kaj ni kuniĝas kun vi
por plu asisti, savi, helpi,
akcepti, akompani, kvietigi,
peticii, manifestacii, defendi,
atesti pri la urĝeco, la graveco, la devo gastigi!

Ne vin ni timas, Aleksandra.
Sed ni timas tiujn, kiuj timas vin!

Paĝo de la komencantoj



La **préposition** (en, antaŭ, sur, inter...) est un mot invariable qui introduit un complément indirect.

Comparez :

La kato ĉasas la muson. (Le chat chasse la souris.)

> **la muson** = complément direct, avec le "n" de l'accusatif

La kato kaŝas sin en la lito. (Le chat se cache dans le lit.) > **en la lito** = complément indirect introduit par la préposition "en" ; pas d'accusatif

Des erreurs ou imprécisions peuvent parfois se cacher dans des manuels de cours, et plus souvent dans des cours en ligne sur internet.

J'ai volontairement choisi l'illustration ci-dessus, trouvée sur Facebook, pour attirer votre attention sur ce type d'erreurs : les deux derniers mots, "dekstre" et "maldekstre" ne sont en rien des prépositions mais des adverbes.

Il faut donc ajouter une préposition pour que l'expression soit complète.

La kato sidas dekstre de la lampo.

La kato sidas maldekstre de la lampo.



Plurelekta demandaro
laŭ verkoj de Robert Llorens
eldonitaj de *Espéranto-Info*

1 - gramatika

a) Tial li ne plu estas juna, li ne estas lerta.

1 - kial ; 2 - kio ; 3 - ke

b) La frato de li estas frato.

1 - lia ; 2 - ŝia ; 3 - ĝia

c) La folio de ĝi (la libro) estas folio.

1 - lia ; 2 - ŝia ; 3 - ĝia

2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "asekuro", "certeco" aŭ "memfido" por traduki la francan "assurance"

1 - confiance en soi :

2 - certitude :

3 - par contrat :

d) elektu "afablaĵo", "atento" aŭ "prizorgemo" por traduki la francan "attention"

1 - tension de l'esprit :

2 - sollicitude :

3 - amabilité :



Superzam'

proponita de
Jean-François Cousineau

1. Kial ne okazis la Pariza U.K. en 1914?

a- pro forpaso de Zamenhof b- pro ekmilito

c- pro forbrulo de la kongresejo

2. Kiu verkis la poemaron Pilgrimo en 1926?

a- Waringhien b- Zamenhof c- Baghy

3. Nur unu el la jenaj diskoj estas de Kajto. Kiu?

a- Amu min b- Kia nokto c- Masko

4. Kiu estis Klara Silbernik rilate al Zamenhof?

a- lia patrino b- lia fratino c- lia edzino

5. Kiu korelativa finaĵo signas manieron?

a- el b- e c- al

6. Kiu estas la dua plej loĝata lando en la mondo? (2012)

a- Hindio b- Indonezio c- Usono

Plurelekta demandaro

1 - gramatika

a : 3 ; b : 2 ; c : 1

2 - vorto-trezora

ĉ1 : eltiri ; ĉ2 : elradiki ; ĉ3 : eltordi

d1 : haltigo ; d2 : halto ; d3 : decido

Solvoj de la demandoj

en EP 114

aŭtuno 2018



vortenigmo

"f-en-o-m-en-o" = fenomeno

Superzam'

1 a > Ĝenevo

2 a > Baghy

3 c > Karnavaletto

4 c > 28 ; 5 b > al

6 b > Supra-lago (Usono)



El la mesaĝkesto de la legantaro

Luc Barbulesco

En ĉi hodiaŭaj tagoj, eblas vidi sur la stacidomaj fasadoj de nia lando la tekston de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, skribitan per grandegaj literoj...

Samtempe, tamen, oni vidas ankaŭ multajn homojn sendungitajn, senhejmajn, senmonajn, sidantajn sur la trotuaroj proksime de la stacidomoj.

La belaj vortoj de la Deklaracio vere estas nuraj vortoj, vanaĵoj («flatus vocis»), Ili faras kaj ŝanĝas nenion... Ĉu iam povus okazi, ke tiuj belegaj vortoj esprimitaj en Esperanto, la sola tutmonda lingvo, finfine helpus la realiĝon de la Homaj Rajtoj ? Kiu scias ?

ndlr :

Sur nia federacia TTT-ejo aperis artikolo pri la Tago 2018 de la Homaj Rajtoj, kun la jena enkonduko:

"Ĉijare, la Homrajta Tago, je la 10a de decembro, kaj la Zamenhof-Tago, je la 15a de decembro, okazos samsemajne. Ĉu ni profitu de tio por ligi la Zamenhof-feston kun la 70-jariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ?"

Plie, en la n° 115 de nia gazeto, estas fotografaĵo pri artikolo de Var-Matin : "Les espérantistes fêtent les Droits de l'Homme".

Verŝajne reage al tiuj tekstoj, nia amiko Luc atentigis nin pri la fakto, ke multo estas plu farota koncerne la Homajn Rajtojn.



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

mai 5 - Saint-Raphaël (83), plage du Dramont : pique-nique du club local - infos : 04 94 83 06 88

mai 18 - Marseille (13), Friche la Belle de Mai : Forum des Langues du Monde

infos : <http://esperanto.marseille.over-blog.com/>

juin 23 - Le Beausset (83) : examens de FEI

infos : triolle.renee@wanadoo.fr

en France

avril 20-23 - Montluçon (03) : Congrès de Sat-Amikaro
infos : daniel.lachassagne@orange.fr

avril 26/mai 4 - Baugé (49) - Château de Grésillon : 9ème "Printemps" - infos : kastelo@gresillon.org

mai 6-10 - Bouresse (86), Kvinpetalo : stage de traduction - infos : <http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr>

mai 10-12 - Strasbourg (67) : Printemps de l'espéranto - <http://esperanto.france.est.free.fr/>

juin 17-21 - Bouresse (86), Kvinpetalo : Promenade dans la nature et Wikipédia.

infos : <http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr>

en Europe

avril 12-16 - Douvres (Grande-Bretagne)

Congrès commun d'Espéranto-France et de l'Association britannique d'espéranto

infos : esperanto-france.org/kongreso.2019

mai 1-5 - Malaga (Espagne) : 78ème Congrès espagnol d'espéranto

infos : www.esperanto.es

mai 3-10 - Malaga (Espagne) : 71ème Congrès des cheminots - infos : esperanto-andalucia.info/

mai 29/juin 2 - Hamelin (Allemagne) : Rencontre familiale

infos : <http://krokodilo.de/baro/baro.php>

juillet 13-20 - Čačak (Serbie) : 52ème Congrès de la Ligue internationale des enseignants d'espéranto

infos : ilei.kongresoj@gmail.com

juillet 20-27 - Lahti (Finlande) : 104ème Congrès international d'UEA

infos : kongresoj@co.uea.org

août 4-11 - Barcelone (Espagne) : 92ème congrès de SAT

infos : <http://satesperanto.org/spip.php?rubrique631>

août 24-31 - Trieste (Italie) : 86ème Congrès italien d'espéranto - infos : kongreso2019.esperanto.it



La 13-a Mediteranea Esperanto-Semajno en «Les Issambres»

2.3. - 9.3. 2019

Jam de pluraj jaroj sinsekve okazas la Mediteranea Esperanto-Semajno en agrabla ĉemara loko en Les Issambres, kie tiutempe floras mimozoj. Flavaj buletoj forte odorantaj karakterizas la francan Provencon. Ili estas tradiciaj simboloj de feliĉo kaj de bonaj rilatoj. Ĉi-jare en la belega feriejo Vacanciel kuniĝis 93 geesperantistoj el dek landoj. Eĉ el la plej malproksima Siberio venis du partoprenantinoj. Samtempe la hotelo gastigis grupon da biciklantoj.

Posttagmezan sabaton bonvenigis nin per aperitivo s-ro Silvain Ceccoto, la estro de la feriejo Vacanciel. Post la vespermanĝo la organizantino de la aranĝo, Christine Graissaguel, prezentis al ni la ĉi-jarajn kursgvidantojn. Poste sekvis interkoniĝo. Mi informis la ĉeestantojn pri la fervojista kaj hispana kongresoj, kiuj okazos ĉi-maje en Malago.

Tuj la sekvan tagon komenciĝis instruado de Esperanto en kvarnivelaj kursoj. Pri komencantoj okupiĝis Christine Graissaguel, progresantojn instruis Michel Dechy laŭ la libroj de Tinĉjo. Li uzis ankaŭ «La bildstrioj kiel lernolibro», kajerojn kiujn li eldonis. Katerina Arbekova el Novosibirsk uzis ludmetodan instruadon kun multaj bildoj, proverboj kaj mallongaj rakontoj. La plej spertajn lernantojn instruis Emnuele Regano el Italio. Liaj filozofiaj prezentoj kaj debatoj, pri diversaj temoj, estis pripensigaj kaj nesolveblaj. Temis ekzemple pri problemoj de etiko, justeco, perforto, vegetarismo kaj veganismo. Oni parolis pri genro kaj sporto, identeco de transgenro al transekso. Okazis debato pri inkluziva lingvo ktp.

Dum la matenaj kafo-paŭzoj, kiujn zorgeme pretigis Monique Prezioso kun sia amikino Simone Marlier, oni povis ne nur babili, trinki kafon aŭ teon, sed eblis ankaŭ saltadi trans la kordon kaj samtempe lerni la kanton «Dek boteloj pendas ĉe la mur». Tion iniciatis Carmen Segarra. La partoprenantoj multe amuziĝis per tiu ludo. Laŭdezire ankaŭ eblis partopreni la programon de la hotelo.

Posttagmezoj estis dediĉitaj al ekskursoj kaj al agrablaj promenoj en la ĉirkaŭaĵo. Dum la tuta semajno regis agrabla suna kaj varma vetero. Du kuraĝulinoj eĉ banis sin en la maro. Iuj profitis liberan tempon por legi, komputili aŭ ludi kartojn.

Al la okazaĵo venis ĵurnalistino por intervjui kelkajn samideanojn kaj fari komunan foton. Sabate aperis artikolo en la loka ĵurnalo Var-matin.

Dum unu posttagmezo ni vizitis ekspozicion pri orkideoj en Roquebrune-sur-Argens ĉe la familia entrepreno de Michel Vacherot, kiu funkcias ekde la jaro 1886-a. Ni

admiris centojn da belegaj, diverskoloraj kaj diversformaj ekzotikaj floroj kaj aŭskultis konsilojn pri ilia kultivado kaj reproduktado. La vizitantoj povis ankaŭ aĉeti ilin. Aliajn tagojn ni promenis ĉe la lagoj Villepey, vizitis la urbon Fréjus kaj St. Raphaël. Interesa estis ekskurso al Tourves, kie troviĝas la «Musée des Gueules Rouges». Tie ni ricevis kaskojn kaj promenis en artefarita instalaĵo imitanta la baŭksit-minejon. La gvidantino rakontis pri la peza kaj malfacila laboro de la ministoj. Por tiuj laboroj estis uzataj ankaŭ azenoj lokitaj tie porvive. En la muzeo ni povis vidi maketo-instalaĵon de ĥemia procedo por produktado de aluminio el baŭksito. En vitrinoj estis prezentataj diversaj aluminiuj objektoj.

Vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj. Katerina Arbekova prezentis al ni sian ŝatatan landon Siberion. Ĉe la fino ŝi organizis nekutiman kvizon pri ĝi. Bonaj respondoj estis rekompencitaj per bombonoj, bildkartoj aŭ glaseto da rusa vodko. Michel Dechy parolis pri «La humuro en la verko de Hergé (Herĵe)». La temo de Manuele Regano traktis «Arton kaj filozofiojn». Nina Korĵenevskaja prezentis al ni la urbon Ufa, kiu situas en Rusio apud Uralo kaj poste rakontis pri la folkloro en Rusio, kiun ŝi akompanis per bildoj. Ege interesa estis la filmo de Jean-François Cousineau pri «Ekspedicio en Suda Afriko». Dum la vizito de Namibio, Bocvano kaj Zimbabvo li spertis eksterordinarajn travivaĵojn kun sia edzino kaj aliaj partoprenantoj.

La 8-an de marto gesinjoroj Prezioso alportis bukedojn da mimozo plukitajn en ilia ĝardeno kaj ĉiu virino ricevis branĉeton por memorigi la Internacian Tagon de Virino. Lastan vesperon la hotelo proponis aperitivan al la gastoj. La direktoro dankis al ĉiuj ĉeestantoj prezentante la tutan skipon de siaj kunlaborantoj.

Niaflanke okazis adiaŭa vespero kun tombolo kaj diversaj artaj prezentoj. La kursanoj ludis diversajn teatraĵojn, deklamis kaj la ĥoruso sub la gvido de Bernard Bigonnet kantis kelkajn esperantajn kantojn. Dancado en akompano de akordiona muziko de la fratinoj Prezioso daŭris ĝis noktomezo.

Dankegon al la organizantoj de la bela evento kaj ĉefe al la familio Prezioso, kiu faras ĉion eblan por kontentigi ĉiujn partoprenantojn, kiuj trankvile ĝuas la semajnon. Ĝis la revido venontjare!

Liba Gabalda



La 13-a MES-2019



L'humour chez Hergé

La humuro en la verko de Hergé [Herje]

MIMOZO
Mi minto, ĉar farto dum dormas la naturo.
Mi luto de Ĝardenoj kaj de Povoĝaj frondoj.
Mi trinka ŝveb-parfumo en vintro nostalgio.
O ĝojo delikata el fura Asinello.
Z. uso de mil inektoj ridof de aŭdo mondo.
O ra ambasadoro en la Provenc-burgo.



Les Issambres



BOQUEBUNE-SUR-ARGENS

L'espéranto, langue bien vivante !

Comme chaque année, les bénévoles accueillent les Espérantistes pour une semaine de stage.

Elle a dit
« Je suis devenue professeure de langues grâce à l'espéranto »
Edith Lohman

